

Esperantigitaj poemoj
de
Maram-al-Masri

« Iŝi » -

Iras nude la Libero -

Ĉu vi vidis lin ? -

Poemo 13 -

Virinoj kiel mi

Tiuj poemoj [estis legitaj](#), aprilon 2016,
de Michel Fontaine kaj Catherine Ratton,
kadre de la radio-elsendo
« Les langues se délient »,
dissendita de la radio-stacioj
[Radio B](#) kaj [RCF Pays de l'Ain](#)
(Bourg en Bresse, Francio).



<https://esperantobourgenbresse.wordpress.com/>

Michel Fontaine esperantigis la poemojn 1, 2, 3, 4.

Jean-François Schelcher verkis la libreton.

(ĉiuj rajtoj pri la tekstoj apartenas al Maram-al-Masri)

Iŝi

Mi vidis iŝin kun kaŝitaj bluaj ekimozoj
Sur la vizaĝo
Iŝiajn vundojn inter gamboj
Iŝian rideton lacan
Iŝian kaptitan revon
Iŝiajn mutajn vortojn
Mi vidis ĉiujn preterpasi surstrate,
Kiel animoj nudpiedaj,
Retroen rigardante,
Time, ke iŝi estus sekvitaj de la tempestaj piedoj,
Ŝtelistinoj de luno,
Iŝi preterpaŝas kun masko de ordinaraj virinoj.
Neniu kapablas rekoni iŝin
Krom tiuj, kiuj similas.

Maram-al-Masri



(ĉiuj rajtoj pri la tekstoj apartenas al Maram-al-Nasri)

Iras nude la libero

Iras nude la libero
Sur siriaj montaroj
En kampoj de rifuĝintoj.
En koton sinkas la piedoj.
Fendetiĝas la manoj
Pro frosto kaj sufero.
Sed ŝi antaŭeniras.

Ŝi preterpasas kun infanoj
Alkroĉitaj al brakoj.
Ili survoje falas.
Sed ŝi antaŭeniras.

Oni rompas al ŝi la piedojn,
Sed ŝi antaŭeniras.
Oni tranĉas al ŝi la gorĝon
Sed ŝi plue kantadas.

Maram-al-Masri



(ĉiuj rajtoj pri la tekstoj apartenas al Maram-al-Nasri)

Ĉu vi vidis lin ?

Li portis sian infanon en brakoj.
Li majstre antaŭeniris,
Kun alta kapo kaj rekta dorso.
Tiom feliĉa kaj fiera estus la infano
Tiel portite en patraj brakoj,
Nur se li vivus.

Maram-al-Masri

Poemo 13

Ŝi : panjo, kio estas libero ?
Panjo : io tre kara.
Ŝi: tiom kara, ke ni ne povas aĉeti ?
Panjo : pro tio ili pagigas nin per nia vivo.

Maram-al-Masri



(ĉiuj rajtoj pri la tekstoj apartenas al Maram-al-Nasri)

*En Granato (Hispanio),
ĉi-tiu teksto estis publike legita
dum renkontiĝo de feminismaj movadoj
el la tuta Eŭropo.*

La virinoj kiel mi

La virinoj kiel mi
ne kapablas paroli.
La vorto blokiĝas engorĝe,
osteto,
ili preferas gluti ĝin.

La virinoj kiel mi
kapablas nur plori,
per ribelaj larmoj
kiuj abrupte
elkrevas kaj forfluas
kvazaŭ el tranĉita vejno.

La virinoj kiel mi
eltenas batojn
kaj ne kuraĝas repagi ilin
ili tremas pro kolero.
kaj bridas ĝin.,

**Enkaĝigitaj leoninoj,
La virinoj kiel mi
revas . . .
pri libereco . . .**

Maram-al-Masri



(Ĉiuj rajtoj pri la tekstoj apartenas al Maram-al-Masri)